

# Espero

# Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Jun. 1906.)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO  
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovile et unus pastor. » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta. »

## ABONEJOJ de E. K.

- |                  |  |
|------------------|--|
| FRANCLANDO       | {<br>Ĉe la Direktoro de E. K.<br>Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, PARIS, V°<br>Ĉe librejo Warnier kaj K°, 46, rue Sainte-Anne, PARIS. |
| ANGLOLANDO       |  |
| BELGLANDO        | : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.  |
| BOHEMUJO-AŬSTRIO | : F. Topič. libr. Ferdinandova 9, PRAHA.   |
| ĈILILANDO        | : S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, SANTIAGO-CHILI.  |
| HOLANDUJO        | : S-o H. B. van ZWET, Heerenweg, 51 bis, UTRECHT,  |
| HUNGARLANDO      | : S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO.   |
| ITALLANDO        | : S-o Jakobo Bianchini, S. Vito al Tagliamento ( <i>Udine</i> ).   |
| HISPANLANDO      | : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias, VALENCIA.   |
| GERMANLANDO      | : Moller et Borel, 95, Prinzenstr, BERLIN.   |
| NOVA ZELANDO     | : S-o A. J. Burgess, libr. Devon Street, NEW PLYMOUTH<br>(New Zealand).  |
| POLUJO           | : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.   |
| RUSLANDO         | : Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24. loĝ. 12. S. PETER-<br>BURGO.  |
| SVISLANDO        | : Librejo Garin, 20, rue Corraterie, GENEVO.   |

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER  
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro.  
— Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

## KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara	} En Franclando	4 frankoj. (1 Sm. 60).		Unu numero:

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝtmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

La koloro de l'adresaj etiketoj indikas la komencon de l'abono: blanka, de oktobro; flava, de januaro; verda, de marto.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn; — duona paĝo: 25 fr.; — 4<sup>a</sup> paĝo: 15 fr.; — 8<sup>a</sup> paĝo: 9 fr.; — 16<sup>a</sup> paĝo: 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj: Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, Paris.

## MUSIKAĴOJ DE S-INO JOSÉE GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenof.	1 fr.
En Songo, poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60.
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i> .	1 fr. 60.
La du Muloj, fablo de La Fontaine.	1 fr. 60.
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski.	1 fr. 25.

## PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro). Ĉiu jaro 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.) Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr. — (La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite). Artikoloj legindaj en la kolekto: Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier), Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée; skizo; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecionej por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista. Raporto historia pri la 2 unuajn jar. de E. K., ktp. ktp.

## BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).	0 fr. 50
(La du verkoj kune mandataj 0 fr. 75)	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II <sup>a</sup> Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.	0 fr. 15
Esperanto?... Qu'est-ce?... Franca broŝur. propag.	0 fr. 10

# ESPERO KATOLIKA.

Honorata per apostola beno de PIO X-a  
la 27-an de Jun. 1906.

---

## ARTIKOLARO

Principoj de Polemiko (LA DIREKTORO). . . . .	257
La Societo de Katolika Vero (KARLO SLATER)	260
Kardinalo Mercier (P-o V.O). . . . .	265
Evolucio de l'Religia Ideo (D-ro VALLIENNE). . . . .	267
Kelkaj rimarkoj pri la Respondo de D-ro V. (EM. PELTIER).	271
Virina Dediço (Poezio : S-INO M.) . . . . .	274
Paĝo de l'Direktoro . . . . .	275
Propaganda kroniko inter katolikoj (EM. P. kaj L. MILHO).	276
Universala komunikilo . . . . .	280
Abonmonoj ricevitaj. . . . .	282
En la mondo Esperantista : Promenado tra la Gazetoj. Bibliografia Kroniko . . . . .	283
Internacia helpa mono (Prof. E. LIME)	285
Ŝakoj	287

---

## ATENTINDA AVIZO

La katolikaj komercistoj kaj industriistoj estas petataj sendi al la Direktoro de **ESPERO KATOLIKA** sian vizitkarton, kun la vortoj « kat. komercisto », aŭ « kat. industriisto ». — Il ricevos interesan komunikajon.

---

## PRINCIPOJ DE POLEMIKO

Mi volus diri kamaniere mi komprenas la polemikon. Tre ofte la polemiko, anstataŭ produkti lumon kaj plikompreniĝon, kontraŭe naskas konfuzon, ironion, malamon.

El libro de Pastro Gratry pri P-o *Henri Perreyve* mi eltiras la belajn parolojn, kiujn oni legos, pri polemiko laŭ Evangelio <sup>1</sup>

<sup>1</sup> *Henri Perreyve* de P-o GRATRY, Paris, DOUNIOL, p. 140, kaj sekv.

« Ĉar la plej granda el niaj malbonoj estas ja la kolera kaj malama ventego, kiu senĉese pligrandiĝas de unu jarcento, — kia feliĉa gloro estus en la penado vere Evangelia, kiu provus venki koleron kaj malamon!

« Kio dividas pli ol ĉio la inteligentojn, se ne la divido de l'koroj? Tiu, kiu sciis detrui aŭ almenaŭ malgrandigi inter ni tiujn mallumajn pasiojn, patrinojn de nuboj kaj ventegoj, — kiujn torentojn da lumo tiu ĉi enirigus en la spiritojn!

« Mi estas certa, ke en ĉiuj kristanaj Eklezioj, kaj en ĉiuj filozofiaj skoloj (mi esceptas nur tiujn, kiujn malŝatas la racion), estas miloj da homoj, kiuj ne renkontas alian barilon, por havi plenan fidon, al la mallumoj naskitaj de pasio kaj trofervoro en la balatado.

« Ĉu tamen estus neebila enkonduki en la bataladon de l'spiritoj novan elementon de boneco, de absoluta boneco: tiu esenca karaktero de Dio?

« Ĉu verkistoj senditaj de Kristo (*ecce ego mitto ad vos skribas*) ne povas pruvi *novan formon de polemiko*, kiu ne estas ĝis nun uzita en la mondo, kaj kiu estus precize la Evangelia polemiko? Tiu nova polemiko havus, kiel fundamentajn regulojn, tiujn parolojn de Kristo « Feliĉegaj estas la pacifistoj; feliĉegaj estas la malseveruloj ĉar ili posedos teron. » — Kiu diras al sia frato Vi estas malsaĝulo, meritas kondamnon. — Se oni frapos vin sur unu vango, prezentu la alian. — *Imitu vian ĉielan Patron, kiu verŝas sian roson sur la malbonulojn kaj sur la bonulojn.*

« Kaj tia estos, eble, ian tagan, la polemiko de l'pastroj. »

Sur alia paĝo, P-o Henri Perreyve skribas al amiko « Ĉu vi estas firme konvinkata pri tio se iam niaj laboroj devas preni formon de sinsekvantaj publikaĵoj; la esenca karaktero, kiun di devas doni al niaj studoj kaj diskutadoj, estas absoluta afableco kaj karito?

« Nenio estas pli malfacila, kaj tio estas preskaŭ neebila. Facile oni komencas en *balzamumita boneco*. En

la unuaj paroloj ĉio estas dolĉegeco. Sed kiam okazas kontraŭdiroj, malkompreniĝoj, ignoroj, malbonfidaj kontraŭaĵoj, blindaj neoj kaj kruelegaj pasioj, — tiam oni indignas, unue per eltenata indigno, kaj poste per kolerega indigno.

« Nu ! ni faru ligon ; ni subtenu unu la alian por malhelpi, per fortegaj decidoj, tion, kio estas preskaŭ neevitebla.

« Ekzistas, oni diras, kontraŭuloj malbonfidemaj. Mi konsentas ; sed ni ne parolas por tiuj ĉi. Ni neniam supozu ke tiaj kontraŭuloj estas antaŭ ni. Ni parolu nur al la bonfido, kiu serĉas Veron. Tial absoluta afableco estas postulata kaj fariĝas la plej granda el la fortoj.

« Fi ! Ĉu ministroj de l'Evangelio ne povus entrepreni solenan penon por fari polemikon kaj apologetikon laŭ la spirito de S. Francisko de Sales, kiu, en siaj diskutoj, akceptis ĉian kontraŭdiron, absurdaĵon, insulton, — kiel Jesuo akceptis survangojn, kaj fine ĉion venkis per la dia forto de absoluta dolĉeco kaj pacienco ?

« Jes, amiko kara, en tio estas forto, kiun ni ne ankoraŭ pruvis, dia forto ne uzita, — ne de la sanktuloj, sed de la verkistoj. Nu ! se ekzistas veraj verkistoj senditaj de Kristo, tiun forton ili uzos. Mi estas firme konvinkata ke, se oni konstante sekvus tiun vojon malgraŭ ĉio ; se oni sciis, — longe petante ĝin de Dio kaj volante, — neniam esti akra, nek severa, nek — kio estas pli malbona — ironia kaj precipe *dolĉ-acidula* ; se oni lernus la arton malkovri eĉ en la plej neprudenta kontraŭulo, unu milonon de racio, se troviĝas, por ĝin akcepti, laŭdi kaj uzi, kiel kemiisto en maso ajn, malkovras milonon da oro ; se oni sciis estis ĉiam, kun scienco kaj lumo, dolĉaj kiel la ŝafido de Dio, mi estas konvinkata, diras mi, ke oni farus mirindaĵojn.

« Ĉiuj, kiuj kredas en la Evangelio, kaj ĉiuj amikoj de justeco kaj racio, estus favoraj al tiuj veraj pacifistoj.

« Sed por tio oni bezonas absolutan kaj firmegan paciencon, neniam forgesotan. »

Ni ne volas fari komentaron pri tiuj belaj paĝoj. Ili estu la idealo de la polemikistoj! Ili estu nia idealo ĉiama! Nur per tiu vojo *malsamideanoj* povas alveni al komuna konsento pri la Vero! EM. PELTIER.

---

## LA SOCIETO DE KATOLIKA VERO

---

Ekzistas en Anglujo Societo granda kaj gravega kies celo, aŭ pli vere celado estas la disvastigado de la principoj kaj beleco de la Katolika Eklezio, kie ajn ebla. Ĝia nomo, *La Societo de Katolika Vero* estas ja konata ĉie tra la tuta mondo, kie ajn popoloj parolas la Anglan lingvon. En la komenco, ĝi estis nur malgranda afero; sed, dum la lastaj jaroj, la Societo pligrandiĝis mirindege kaj pruvis sin utilega ilo metante en la manojn de la popolo, librojn, libretojn (pamfletojn) kaj folietojn por liveri ĉiajn informojn pri katolikeco, po miliono da ekzempleroj ĉiujare.

La Societo ŝuldas sian fondiĝon al la mortinta Kardinalo Vaughan, kiam li estis Rektoro de la Kolegio por Fremdaj Misioj, ĉe *Mill Hill*. Tiu ĉi eminenta Ekleziulo, rimarkinte la potencegan influon de Gazetaro, kiel veran faktoron en moderna vivado, decidis kapti tiun potencan ilon, el kiu oni jam faris tiom da malbono, kaj utiligi ĝin en la vera servado al Dio. Lia forta vivdevizo estis « Ĉiajn aferojn grandiozajn aŭ humilajn oni devas utiligi por pligrandigi la Gloron de Dio per la propagando de Katolika Kredo. » Tion li efektivigis per la fondo de S. de K. V. En 1872 li fariĝis Episkopo de Salford kaj la devoj de la nova ofico multe lin malhelpis por direkti la antaŭeniron de la Societo; kaj nature, dum kelka tempo, efektiviĝis nenia progreso, ĝis fine, en jaro 1884, io okazis kio ŝanĝis ĉion.

Du distingitaj kleruloj nome: Pastro W. H. Cologan kaj S-ro James Britten, jam interesitaj en la afero, nun

iĝis kunlaborantoj kaj sub ilia administracio la Societo sukcesege reviviĝis kaj fariĝis multe pli granda kaj grava afero ol antaŭe. Kvankam la celo de la Societo estas la disvastigado de Katolika Vero, *ciel kaj ĉiam*, tamen, ĝi precipe klopodadas por efektiviĝi tion « per la presaĵo ». Tiamaniere ĝi jam donadis plej valorindan helpon al la Eklezio en Anglujo kaj sendube multon da sia sukceso ŝuldas la Societo al la du jam cititaj fervoruloj, kiuj sindoneme donacis siajn servojn, dum pli ol 25 jaroj, al la Sankta entrepreno. La Societo jam eldonis multenombre librojn pri religiaj disputadoj, historio kaj pieco, kun kontentigaj rezultatoj.

Unu rimarkinda entrepreno de la Societo troviĝas en la eldonado de bonegaj pamfletoj, je kosto da unu penco, kiuj aperintaj en plaĉigaj formoj kaj pritraktante preskaŭ ĉiajn elpenseblajn subjektojn, estas ja plej ŝatinda literaturo. Jaro post jaro milionoj da ili eldoniĝis kaj ĉiu havinte la saman celon : Antaŭenigi Katolikan Veron kaj Praktikadon! Tial, libraro, kiu konsistas el miloj da libroj, kontentiganta ĉiajn bezonojn kaj konvena al ĉiaj literaturamantoj, religia kaj instruiga, morala kaj sociala, troviĝas ĉe la vera malriĉularo katolika kaj nekatolika kaj faradas bonon tie pro sia malkareco. En preskaŭ ĉiu Katolika Preĝejo en Anglujo troviĝas, apud la ĉefa pordo, librujo enhavanta kelkajn dekduojn da tiuj ĉi diversaj unupencaj libretoj, kiujn ĉiu aĉetonto povas ekzameni antaŭ ol aĉeti. Elektinte la deziritan, la pago efektiviĝas per la simpla enmeto de monero aŭ moneroj tra montrueto en monskatoleton speciale faritan meze de la tenujo. La Societo ankaŭ jam eldonis pli ol milionon da Preĝaretoj je sama prezo (unu penco). La Evangeliojn kune kun klarigaĵoj kaj diversajn aliajn librojn pri la Sanktaj skribaĵoj oni vendadis en nombro preskaŭ nekulkulebla.

Tamen, la Societo neniel okupas sin sole per malkaraj eldonaĵoj, sed ankaŭ publikigas verkojn elegante kaj arte presitajn kun speciale desegnitaj kovriloj, je iom pli alta prezo, sed tamen, veremodera, pri historio, biografio,

poezio, romanoj kaj nuntempaj religiaj demandoj. Tamen, eĉ tiu ĉi multego da agado neniel elmontras la finiĝon rilate al la « Presaĵo », ĉar ĝi ankaŭ fondis bibliotekon pruntedonan por blinduloj. Rilate ĉitiun bibliotekon estas jam en rondirado, inter la Blindularo, 200 libroj presitaj per Braille sistemo pri Religiaj Instrukcioj kaj Piecoj, ankaŭ kelkaj pri amuzaĵoj. Kian benon devas niaj Katolikaj Geblinduloj trovi en tiu ĉi Libraro, precipe ĉar antaŭe ili, pro siaj suferado kaj ĉiama mallumeco, ne povis ĝui la utilecon, konsolecon kaj plezuron de tiu Katolika Verkaro?

Laŭbezone la Soc. ankaŭ disdonas folietojn aŭ propagandilojn uzotajn ĉe specialaj okazoj. Jam ili troviĝis de la plej granda graveco, ĉar, kiam okazas iuj el la kontraŭkatolikaj kunvenoj, kiujn oni rimarkas tiel ofte en Anglujo, la Societo laŭ eblo, disdonas libere tiujn folietojn klarigantajn la Veron Katolikan kaj bone preparitajn por forigi nesciecon, antaŭjuĝojn kaj malveraĵojn de tiuj, kiuj nur ĉeestas tiajn kunvenojn por aŭdi nian Eklezion malbenata, kaj tiel ili havas okazon koni ĝian belecon kaj verecon.

La Societo etendas sian influon ekster la Gazetaro. Ofte ĝi helpas la paroladistojn ĉar ĝi liveras diversajn seriojn da kliŝaĵoj por Magia Lanterno, per kiuj oni faras belajn kaj instruigajn lecionojn brilege ilustritajn. Kune kun la klarig-legaĵoj, tiuj ĉi « projekcioj » estas tre ŝatataj, ĉar ili traktas pri diversaj subjektoj tre intersaj rilate al Katolikeco kaj Historio. Jam la Societo posedas 40 diversajn seriojn da tiuj ĉi vidaĵoj, kaj unu serio pri Katolika Arto enhavas preskaŭ 200 treege belajn kopiojn el la pentraĵaroj de la plej gloraj Italaj Majstroj en la Pentrarto.

Alian specialan fakon la Societo kondukadas rilate al la bonfarado de Katolikaj Maristoj el ĉiuj gradoj. En 1891, speciala komitato fondiĝis por tiu celo kaj jam ĝi pruviĝis tre utila fondinte kelkajn klubejojn kaj loĝejojn por katolikaj maristoj. Ne estas nun necese ke tiuj



laboristoj loĝadu en nekatolikaj loĝejoj, kiujn oni konstruis en preskaŭ ĉiu marborda urbo. Speciale por maristoj la Societo eldonas preĝaron nomatan *La Gvidilo al ĉielo*, kaj la Estraro de la Admiralto jam alprenis ĝin por uzado en la Marservado.

Kvankam la penadoj supre cititaj pruvis sin tiel bonegaj, troviĝas ja alia Afero tre distingita kaj ankaŭ treege utila. Ĝi jam efektivigis neegaligitan bonon por Katolikeco. Mi volas paroli pri la ĉiujara Kongreseto de la Societo. Tiu ĉi estas kuveno la plej simila en Anglujo al la Monstraj Kongresoj de Katolikoj, kiuj okazas ofte en Germanujo kaj en aliaj landoj, kaj ĝi jam revivigis katolikan aktivecon en Anglujo.

La Prezidanto, ĉe tiuj ĉi Kongresetoj estas ĉiam la Kardinalo aŭ Ĉefepiskopo de Westminster, Londono. Kardinalo Vaughan dum sia prezidanteco faris multe da gravegaj paroladoj kaj la nuna Ĉefepiskopo Bourne jam faris tre gravajn paroladojn, pri Katolika Edukado kaj la Eklezio en Francujo, kiujn la nuna Katolikaro Angla ĉiam bone memoros. En tiaj okazoj neniam speciala temo estas trudata; sed oni malfermas diskutadon dum kiu oni povas pritrakti ion gravan rilate al la plej diskutindaj tiamaj aferoj, ĉu religiaj aŭ socialaj. Fakte la ĉiujara Kongreseto jam fariĝis unu el la plej efektivigaj okazintaĵoj kaj vere vivigilo en la Katolika Vivado en Anglujo.

Ankaŭ ĉiam ĝi estas honorata per la alesto de la plej altgradaj Ekleziuloj kaj de la plej kleregaj kaj piaj pastroj. Dum kelkaj jaroj ĵus pasintaj eldonas la Societo ĵurnalon nomatan *Notoj pri Katolikaj Libroj*. Ĝi estas interesa gazeto kaj enhavas artikolojn aŭ speciale verkitajn de Katolikoj aŭ tre intersajn por ili. Ĝi enhavas ankaŭ Kronikon de la Societaj Aferoj jam efektivigitaj. Ŝajnas tute ne necese diri ke la Societo jam ricevis la varmegan aprobon de Lia Sankta Moŝto, ĉe Romo, kaj riĉiĝis per indulgencoj gravaj. La Membroj de la Angla Hierarkio certigis ofte pri ĝia utilegeco. En letero al sia Pastraro, D-ro Casartelli laŭdis multe la Societon kaj konstatis ke

ĝia bonfarado disvastiĝis malproksimen en aliajn landojn.

Societoj havantaj la saman nomon kaj celon fondiĝis en Irlando, Skotlando, Nov-Jorko, San Francisko, Kanadujo, Bombay kaj aliaj lokoj. Ĉiuj el ili penadas klopodi sammaniere kiel la Angla kaj pli-malpli sukcesis. La Societo Irlanda ankaŭ eldonas Preĝareton por unu penco presitan en Gaelika Lingvo kaj ĝi estas nun multe uzata pro la penadoj de la Gaelika Ligo por la revivigo de la Nacia Lingvo. Je lasta kalkulo, la Angla Membraro nombris 1,500. La jara kotizaĵo estas 10 ŝilingoj kaj per la pago da 10 funtoj sterlingaj oni restas Membro la tutan vivadon. Ŝajnas ja rimarkinde ke la Membraro de tiu gravega Societo ne troviĝas multe pli granda; sed kvankam preskaŭ ĉiu Katoliko posedas unu aŭ pli da ĝiaj libroj, tre malmultaj eĉ ekpensas pri unuiĝo, aŭ ne povas elspezi tiom da ekstra-mono ĉiujare. Eble post nelonge oni penados por havi pli grandan Membraron kun malpli alta kaj populara kotizaĵo, same kiel en la Katolika Federacio.

Tiuj, kiuj pagas ne malpli ol 1 gineon rajtas ricevi unu ekzempleron el ĉiuj eldonaĵoj publikigitaj dum jaro de abono kaj kies prezoj ne superas 6 pencojn. Ĉiuj monate ordinaraj membroj ricevas senpage *Notojn pri Katolikaj Libroj*. Ili ankaŭ havas rajton eniri senpage en ĉiujn kunvenojn dum Kongreseto kaj plie ricevi diskonton da 25 % por acetaĵoj da 5 ŝilingoj aŭ pli.

Societo farante tian klopodadon en nekatolika Lando verege meritas universalan subtenadon. Kiom la mal-kareco de librovendado, ĝi ankaŭ helpadas la neinstruitulojn al pli bona scio de ilia Religio. Ĝi disvastigadas inter Katolikoj sciencon pri Katolika Vereco kaj venigas en pli apudan unuiĝon la Katolikojn fervore klopodantajn tra la tuta lando. Rilate al la suprecitita fakto. Dr Bourne, en sia adreso al la Societo ĉe Birmingham, en 1904, rimarkigis kiom da bono ĝi jam efektivigis, speciale en Anglujo, unuiĝante en komuna klopodado ĉiujn sekciojn

de la tuta Eklezianaro. Sed eĉ se troviĝus neniam malkomprenado kaj falsdiraĵoj inter la diversaj Eklezianoj k. c., ni ankoraŭ bezonus tian Societon kiel potencon perilon en nia propagando. Ĝi ja estas perilo atingante milionojn da niaj sampatrujanoj, kiuj, ne estante anoj de nia Eklezio, restadas ekstere de nia ordinara influo. Ili neniam eniras en niajn preĝejojn kaj ne povas aŭdi niajn predikojn; tial devigiĝas al ni disvastigadi la instruadon de la Eklezio malproksimen en tia maniero kaj tiel amasege, ke la eksteruloj, pli aŭ malpli frue, trovos ĝin antaŭ si sur sia propra vojo.

Nu! eble tiu ĉi estas nur revo sed vere ĝi povas esti realaĵo? Jen! — Rimarkante la kreskadon de nia kara Lingvo kaj — la plemultiĝon da katolikaj Societoj ĉiulandaj spite la pli-malpli ateistaj Registaroj, ĉu ne estos efektiviginda la unuiĝo de ĉiuj katolikaj Societoj samcelaj sub la verda standardo de Esperanto? kaj eĉ se nur la komitaturo bone konus nian Lingvon, oni povus interkorespondadi pri afecoj fortigaj por nia Sankta Celado kaj tiam fortegiĝos kaj vere praviĝos la nomo katolikeco.

Karlo SLATER.

**Noto.** — La konkludo de tiu artikolo estas certe treatentinda. Flanke de ĝi, ni pensas, ke la katolikaj Esperantistoj farus utilan entreprenon, se ili fondus mem Societon Esperantistan de katolika Vero, por la disvastigado de katolikaj libroj per Esperanto. Ni esperas liveri al niaj legantoj ĝeneralan skizon de tia Societo, kies fondo povus esti pridiskutata kaj efektivigita dum la *Tria Kongreso*.

(*La Direktoro.*)

**KARDINALO DEZIDERATO-JOZEFO MERCIER**

*Ĉefepishopo Mehlena, Primato de Belgujo.*

Belgujo ĝuas la alte ŝatindan privilegion, ke ĝi konsistas nur el unu sola eklezia provinco, sub la regado de

l'Meĥlena Ĉefepiskopo. La diversaj eparĥioj estas intime interligitaj, kaj, sub la konduko de sia Episkoparo, ili ĉiuj kunlaboras por la divastigo de la religio kaj la prospereco de la lando. Fakte, pro la fideleco al la prapatra Kredo, pro la unuiĝo, la paco, la prospero en komercado, industrio kaj socialaj institucioj, tiu ĉi landeto okupas belan lokon en la naciaro.

Ĉiam la Belgaj Episkopoj rigardis kiel sian unuan devon, esti tutkore kaj tutanime sindonaj al la Sidejo de Petro; nun ili estos ankoraŭ plifidele (se eble) alligitaj al la S. Patro, tial ke Li bonvolis enirigi ilian Primaton en la S. Kolegion, sian konsilantaron.

La Meĥlena Ĉefepiskopo, mondfama pro sia eminenta scienco, ĉie altŝatata pro siaj sciencoplenaj verkoj, de ĉiuj admirata pro sia proverba simpleco kaj ekzempla humileco, ankoraŭ plibone sentigos nun sian bonfarantan influon, pro tio ke Li fariĝis nun kardinalo, Princo de la sankta Roma Eklezio.

Tial la tuta katolika Belgujo ĝojegas kaj jubileas.

Kiom ajn malforta kaj sensona estas nia humila voĉeto, tamen ĝi maltimas miksi sian jubilean krieton kun la gajega jubileado, kiu ĉie aŭdiĝas por la honoro de la nova kardinalo. La amata Papo, kiu Lin levis al tiu altega honoro, havas S. Jozefon kiel Patronon; la Kardinalo ankaŭ nomiĝas Jozefo beno de S. Jozefo de l'altaj ĉieloĵ la feliĉan tagon de l'altiĝo de tiu ĉi nova alkreskanta filo Jozefo: *Filius accrescens Joseph*. Jes, alkresku pli alten, eminenta kaj amata Prelato, supreniru la ŝtuparon de l'plejalta trono de l'mondo, proksimiĝu kaj estu la apudulo de Tiu, Kiu sur la tero ne konas iun super si. El la tuta koro vi diris: « Sankta Patro, mi estas al Vi por la tuta vivo kaj ĝis la morto. » Via Roma purpura vestaĵo laŭte krias ke Vi estas sindona al Li ĝis la elverŝo de via sango mem. La mondo estas en malordo kaj maltrankvileco; kaj la feliĉa Belgujo mem iome suferas pro tiu ĝenerala malsano; sed, kiel la Episkopoj antaŭ kvarona jarcento sub la konduko de alia kardinalo, refaris la pacon;

tiel same vi alkreskigos vian karan landon en paco kaj prospereco por la honoro de Dio kaj la feliĉo kaj saviĝo de l'popolo.

Al Vi do estu dediĉita jena Kronogramo :

aL Lla karDInaLa Moŝto Ĉlo feLIĈa kaJ ĝoJIga.

Kaj en la nome de la Belga Esperantistaro, jena :

ĝoJe nI akLaMas La Ĉefpastron  
karDInaLIgIntan nIan Lertan ĈefepIskopon.

V. O.

## EVOLUCIO DE L'RELIGIA IDEO

(*Respondo al D-ro Melin.*)<sup>1</sup>

En la numero 37 de *Espero Katolika*, unu leganto, en artikolo rimarkinde verkita laŭ Esperanta stilo, kritikis mian verketon pri *Evolucio de l'religia ideo*, publikigitan en *Internacia Scienca revuo*. Li diras, ke mi publikigis serion da artikoloj. Tiu esprimo ne estas tute ĝusta : mi skribis nur unu artikolon, kiun, pro ĝia longeco, la preŝisto dividis laŭ tri partoj aŭ prefere laŭ tri sinsekvaj preŝeltiraĵoj.

Mia estiminda kontraŭulo min riproĉas, ke mi liveris neniun pruvon. Li estas tute prava. Temo tiel vasta, kiel tiu, kiun mi traktis, postulus, por esti plene studita, ne kelkapaĝan artikoleton, sed multegvoluman verkegon. Do mi nur tuŝetis tre rapide la supraĵon de ĉefaj fariĝoj ; sed mi ne ilin enprofundiĝis kaj mi donis neniujn pruvojn de miaj certigoj, supozante, ke la legantoj de Scienca Revuo konas la fiizikajn, ĥemiajn, zoologiajn, astronomiajn, geologiajn, paleontologiajn, antropologiajn, etnografiajn, anatomiajn, fiziologiajn, patologiajn, embriologiajn, ontologiajn, filogeniajn, klimatologiajn, geografiajn, filolo-

<sup>1</sup> Vidu *Espero Katolika* aprila, p. 197. — Tiu ĉi *Respondo* alvenis tro malfrue por esti presita en nia maja n° 38.

giajn kaj historiajn observadojn, sur kiujn mi min apogis. Se iuj, inter tiuj legantoj, ilin ne konas, mi tion bedaŭras : sed Scienca Revuo ne povas esti libro por lernantoj, nek mi profesoro, komisiita por ilin instrui.

Estas bedaŭrinde, ke mia elokventa kritikanto, estu skribinta sian artikolon, ne leginte la finon de mia verketo. Li estus vidinta tiujn frazojn.

« Vero estas tio, kio estas. Sed tio, kio estas, havas nenion komunan kun niaj sentoj, niaj esperoj, niaj timoj. Vanè ni deziras, ke io estu ; se vere tiu io ne estas, nia deziro ne donos al ĝi ekziston. Vane ni timas, ke io estos ; se vere tiu io estas, nia timo ne malhelpos, ke ĝi ekzistu. »

Pli malsupre :

« Ĉu homo havas rimedon por apartigi Veron el Malvero ? Jes. Li havas rimedon, ununuran rimedon ; sed ĝi estas neerariga la *observado*, la observado centfoje, milfoje ripetita de cent, de mil diversaj observantoj. Ĉiuj aliaj procedoj, kiaj ajn ili estu, kredoj aŭ hipotezoj, havas nenian valoron, tiel longatempe kiam la fina observado ne ilin pravigis. Certe ĉiu homo estas libera kredi tion, kio plej plaĉas al lia sento ; sed tiu kredo povas aliformiĝi en veron, nur kiam eksperimento konstatis ĝian ekziston kaj ĝin rajtigis. »

En la pasinta tempo, la homo ne estis kapabla observi la naturajn fenomenojn ; kaj li ilin klarigis per supernaturaj elpensitaĵoj, kiuj formis la mitologiojn. Sed de du kaj precipe de unu jarcento, grava ŝanĝo okazis en la cerbeco de l'homaro, kaj ju pli Scienco grandiĝis, des pli malgrandiĝis supernatureco. Hodiaŭ la veraj sciencistoj ne akceptas plu la supernaturecon : por ili, ĝi estas la malhumila maltrankvileco de animo, kiu volas, spite de ĉiuj neeblaĵoj, klarigi la neklarigeblecon, kaj kiu ne konsentas konfesi sian malpotencon kaj sian nesciecon.

Kiam la nunaj sciencistoj ne povas klarigi fenomenon, ili humile respondas :

« Mi ne scias hodiaŭ ; sed mi scias, ke la kaŭzo de tiu fenomeno ne estas supernatura kaj en la venonta tempo,

kiam la sciencaj esplorrimedoj estos pli perfektigitaj, niaj posteuloj trovos ĝian naturan klarigon. »

Mi ne tre ŝatas citaĵojn, ĉar ili montras nur la privatan opinion de ia homo, eble tre kompetanta, sed kiu, tial ke li estas homo, povas erari. Tamen, ĉar mia sincere kredema atakanto ĵetas al mia kapo citaĵon de Virchow, mi resendos al li la pilkon (Ho ! tre ĝentile !), citante miavice tiun frazon de la sama aŭtoro :

« Supernatureco, li diras, estas granda X, metita sur la limon de homaj konoj ; tuj kiam tiu limo malproksimiĝas, samtempe la granda X malproksimiĝas kun ĝi. »

Mia honorinda kontraŭstaranto min riproĉas, ke mi atakis la Mezepokon kaj la historion. Tiu riproĉo ne estas justa ; kaj li min malbone komprenis. Estus malsaĝulo tiu, kiu riproĉus historion. Historiaj fariĝoj estas la senpera kaj neevitebla sekvo de antaŭaj haŭzoj ; ili fariĝas siavice novaj kaŭzoj por venontaj fariĝoj ; kaj mia kritikanto estas tute prava, dirante, ke ili obeas la leĝojn de evolucio. Do mi ne atakis ; mi konstatis, eble kun bedaŭro, sed mi nur konstatis. Estas same pri Eklezio kaj pri papeco. La historio montras, ke, je la XII<sup>a</sup> jarcento, orienta Eŭropo sin disigis el ĝi, ke, je la XVI<sup>a</sup> jarcento, norda Eŭropo faris la samon : kuj nun ni vidas, ke la sudaj Eŭropaj nacioj ekpenas sin liberigi el ĝia potenco. Do mi ne atakis, mi konstatis, ke la papeco pli kaj pli malfortiĝas. Evidente tiu plimalfortiĝo devenas de antaŭaj kaŭzoj. Eble se Eklezio estus pli bone kompreninta sian taskon, anstataŭ malvastiĝi, ĝi kontraŭe estus pli kaj pli vastiĝinta. Sed, kiel diras mia talenta kontraŭulo

« La religioj, anstataŭ ĉiam progresadi, returnen iradas forlasante iom post iom sian primitivan purecon. »

Neniam mi estus trovinta pli ĝustan frazon por klarigi la malrapidan sed iom-post-ioman dronadon de la papeco.

Mi tre bone scias, ke famaj Ekleziaj apologiistoj penadis ĝin senkulpigi : sed mi ne tre ŝatas tiujn malverajn historiistojn, kaj ili inspiras al mi neniun konfidon. Efektive, kiaj ajn ili estu, al kia ajn partio ili apartenu, apolo-

giistoj ne estas historiistoj, sed nur advokatoj, kiuj procesas por sia kliento. Por gajni ilian proceson, ĉiuj rimedoj taŭgas ; kaj ili senŝancele ĉerpas en historio fariĝojn favorajn por sia tezo, dum ili lasas en ombro la malfavorajn. Vera historiisto kontraŭe estas nek apologiisto, nek malapologiisto ; li skribas ne por pruvi, sed por rakonti ; la unika celo de liaj penadoj estas : konstati Veron ; kaj por li la religiaj fenomenoj, kia ajn estu ilia graveco, estas tiel naturaj kiel la aliaj historiaj fariĝoj.

Mi vidis kun bedaŭro, ke, komparinte la papecon kun defalinta ĉefanĝelo, mi multe ĉagrenis la religian koron de mia kontraŭulo ; ĉar li trifoje ripetas tiun frazon en sia artikolo. Sed, tial ke la ĉefanĝeloj ĉu falintaj ĉu ne falintaj estas nur mitologiaj personoj, kiuj neniam ekzistis, mia komparo estas do simple literatura kaj sin apogas sur neniun sciencan fundamenton. Pro tio, tre volonte kaj sen ia malfacileco mi ĝin forĵetas por lin plezurigi.

Cetere el la legado de tiuj du artikoloj, la lia kaj la mia, oni povas eltiri la jenan konkludon

Por ke du kontraŭuloj povu interbatali parole, necese estas, eĉ necesege, ke ili uzu la samajn vortojn laŭ la sama senco. Sen tio, ili parolas du lingvojn malsamajn, kaj ne povas sin kompreni reciproke. Tio estas tre videbla, kiam oni komparas niajn ambaŭ verketojn. Por mi, Vero estas tio, kio estas ; por mia kontraŭbatalanto, Vero estas tio, kio plaĉas al li, tio, kio plej bone akordiĝas kun la plej intimaj sentoj de lia koro. Kiam oni legas lian artikolon, oni sentas, ke la Kredo regas en lia animo estre kaj entuziasme, ke en tiu animo ĝi estas kontraŭbatalita de nenio, fine ke li kredas supernaturecon, kiel cetere li tion malkaŝe konfesas en la paĝoj 199 kaj 200, kaj tiun supernaturecon ne konstatablan li nomas Vero. Do li kredas Veron, ne rimarkante, ke tiuj du vortoj *Kredi* kaj *Vero* ne povas kuniĝi, kaj liveras frazon tute sensencan kaj tute ne kompreneblan. Oni ne kredas Veron ; oni ĝin konstatas. Tiel longe kiam oni kredas, ke ia afero estas vera, tio pravas, ke oni ne estas certa pri ĝi ; ĉar tuj kiam oni



konstatis, ke ĝi estas vera, tiam oni ne kredas plu, sed oni estas certa. Ekzemple : mi ne kredas, ke la tero rondiras ĉirkaŭ la suno, ĉar mi estas certa pri tio ; sed mi kredas, ke la tero kaj aliaj planedoj devenas de l'suno ; ĉar kvankam la teorio de Laplace estas tre verŝajna, tamen ĝi ne estas tute certiga, kaj eble, sed ne kredeble, morgaŭ alia sciencisto eltrovos alian teorion ankoraŭ pli verŝajnan, kiu ĝin detruos.

Do mia estiminda kontraŭulo ne respondis al mia artikolo, ĉar li sin metis sur kampon, sur kiu mi ne troviĝas, sekve sur kiu li ne povis min renkonti kaj min kontraŭbatali. Li nur konigis al la legantaro la staton de sia animo, la plej intimajn sentojn de sia koro, la ĉagrenon, kiun li sentis, legante mian artikolon. Tion mi sincere bedaŭras ; ĉar neniam mi intencis vundi la sentojn de iu ajn. Cetere, same kiel pri gustoj kaj koloroj, oni ne povas diskuti pri sentoj. Pro tio, al scienca verko oni devas respondi science en *Scienca Revuo*, sed ne katolike en *Revuo katolika*.

D-ro VALLIENNE.

### KELKAJ RIMARKOJ PRI LA RESPONDO DE D-ro VALLIENNE

Mi tuj diras, ke mi intencas respondi mem al la lasta parto de la Studo de D-ro Vallienne, aperinta en *Internacia Scienca Revuo* Aprila, kaj kiun D-ro Melin ne povis koni, kiam li skribis sian artikolon. Mi respondos mem, tial ke tiu parto de la Studo koncernas la pastraron kaj la Eklezion. Mi volas kodiaŭ fari nur kelkajn rimarkojn pri la Respondo de D-ro Vallienne.

1. — Estas tre bedaŭrinde, mi pensas, ke por legi kaj plene kompreni la Studon de D-ro Vallienne oni devas koni la observadajn konkludojn de 18 tre malfacilajn kaj vastajn sciencojn, kies unu sufiĉas por okupi plene la vivon de *unu* scienculo. Estas iom malfacile akcepti, sen plua ekzameno, ke *ĉiuj konkludoj el ĉiuj suprecititaj*

*sciencoj*, sur kiuj sin apogis D-ro Vallienne, *estas absolute certaj, absolute nediskuteblaj!* Ŝajnas, ke D-ro Vallienne atendas tro de siaj legantoj, eĉ de legantoj de *Internacia Sciencia Revuo* : tia akcepto postulas konfidon (t. e. homan kredon) tro grandon en la aŭtoritato de la Scienculoj; fidon pli grandan ol tiu postulita de katolikoj rilate al Dia aŭtoritato.

2. — Plezure mi konsentas kun D-ro Vallienne pri la difino de la Vero *Vero estas tio, kio estas*, Ĝi estas difino liverita de Bossuet mem. Ankaŭ oni povas akcepti, ke « kio estas » estas konstatebla nur per la « observado », — ĉar certe D-ro Vallienne ne limigas la observadon al tio, kio povas esti observata *per sentoj*.

Estas ĝenerale konsentita, mi pensas, ke la Biologio havas limojn kaj ne sufiĉas por liveri kontentigajn klarigojn pri ĉio. La konsciencaj kaj intelektaj faktoj ne estas klarigeblaj per la biologio, sed per alia scienco ankaŭ fondita sur observado, t. e. la psikologio. La *religiemeco* de homo estas do observebla. Oni povas konstati ke ĝi « estas », do ke ĝi estas « vero ». Estus tro longe klarigite ĉi kiamaniere « la observado centfoje, milfoje ripetita », montras, ke ekzistas ne nur vero fizika, ne nur vero psikologia, metafizika, natura-religia, sed ankaŭ supernatura-religia. La faktoj supernaturaj estas same observeblaj kiel la naturaj. La sciencistoj do ne havas rajton diri, ke ili « ne akceptas la supernaturecon », ke « kaŭzo de fenomeno ne estas supernatura ». — Ĉar ili malkovris, ke *kelkaj* naturaj faktoj estis antaŭe juĝitaj kiel supernaturaj, kaj troviĝis naturaj per pliperfektiĝo de observadaj rimedoj, — ili tamen ne rajtas konkludi *a priori-e*, ke *ĉiuj* faktoj juĝitaj « supernaturaj » estas naturaj : tio estus simple sofismo.

3. — La frazo citita : « La religioj, anstataŭ ĉiam progresadi, returnen iradas forlasante iom post sian primitivan purecon », ne estas komprenita de D-ro Vallienne kiel ĝi estas skribita de D-ro M. Unue D-ro M. skribis *la plimulto el la religioj*, ne ĉiuj. Due, oni klare vidas per

# ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesa“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siųsti reikia pagal šio adreso: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

*Gruodžio 20 (sausio 2) d.*

Paskutiniaisiais laikais labai žymiai pasidau-gino mirties bausmių skaičius. Pereitą sa-vaite nubaušta buvo mirtimi savaitės laike net 50 žmonių. Nebuvo tos dienos, kad ke-li nebutų nušauti ar pakarti. Nėra tatai dyvy, kad rusų laikraščiai kaipo didžiausią kokią naujiną pažymi, kad gruodžio 13 d. nė vienas žmogus nebuvo mirtim nubauštas.

Prieš—rinkimų agitacija eina vis smar-tyn. Vienijasi pirmeiviškosios partijos, vie-nijas ir juodašimčiai. Žinoma, prieš suvie-nytas pirmeiviškų partijų spēkas neatsispirs pastarieji, nors kaip ir nesispirtų.

Ir pas mus, Lietuvoje, teipat subruzdo visi. Mūsų atžagareiviai-dvarininkai dirbą išsijuosę, tveria komitetus ir visokius būdus sumano, kaip lengviausiai butų žmonėms akis apdumti.

Bet, tikimes, veltui nuveis tasai jų ne-lemtas darbas. Šimet lietuviai dar geriaus susiorganizuos (susitvarkys) ir dar aiškiaus parodys dvarponiams, kad Lietuvos liaudis jau susiprato ir žino, kad sau apginėjus gali rasti ir ras tik savo tarpe. Nors kai-kurie ir nori ir stengiasi žmonėms įkalbėti,

buk bė dvarų Lietuva gyventi nebegali, bet Lietuvos darbo žmonės, sodiečiai, parodys, kad galima be jų kuopuikiausiai apsi-  
versti. Prie pilno Lietuvos liaudies laimėji-  
mo šiais rinkimais, tikimes, labai-labai pri-  
sidės susivienijimas dviejų ietekmingiausių  
sodžiuje lietuviškųjų partijų — Lietuvių  
Demokratų (Tautininkų) ir Lietuvos De-  
mokratų. Pirmasai žingsnis tam susivieniji-  
mui jau padarytas. Vilniaus lietuvių rinki-  
mo komitetas susitvėrė iš tų dviejų partijų  
atstovų.

Komitetas tas apima podraug su Vilniaus  
miestu ir Vilniaus guberniją ir žada kuo-  
arčiausiai susijungti su kitų lietuviškųjų  
gubernijų lietuvių komitetais.

## Smugis lenkomanijai.

Šventas Tėvas panaikino pagalias teip ilgai  
vartoti bažnyčiose pridedamose pamaldose jų  
kalbą.

Lenkų laikraščiai dėlei tos priežasties  
labai užsipuola ant Šventojo Tėvo, nes lei-  
dimas vartoti bažnyčiose baltgudžių kalbą  
padėsias platintis rusifikacijai. Bet mes  
suprantame dėlei kokių priežastčių lenkų  
laikraščiams teip baisiai nepatiko Šventojo  
Tėvo pasielgimas kas link prislėgtosios balt-  
gudžių kalbos. Mat užgintai esant baltgud-  
žių kalbai lenkomaniškoji kunigija galėjo  
kuopuikiausiai platinti savo lenkystę skelb-  
dama Dievo žodį lenkiškai, mokidama pote-  
rių lenkiškai, liepdama bažnyčioje giedoti  
lenkiškai. Ir Baltgudija buvo paneši į Len-  
kiją. Lenkų širdis gyveno viltimi, kad po  
metų vis gi kada nors susilenkins baltgud-  
žiai ir dideli Baltgudijos plotai taps Lenkija.

Jai nerupėjo tas, kad žmonės per pamokslus žiovavo, kad nieko nesuprato.

Teip lenkomanai kunigai elgesi su lietuviais, teip jie darė ir su baltgudžiais.

Dabar gi leidus vartoti bažnyčiose ir baltgudžių kalbą, baltgudžiai, kurie pamažu pradeda jau tautiškai susiprasti, isikurė jau sau ir laikraščius ir liovėsi lenkus labdariais laike, pareikalaus priderančių sautiesų ir tuomet lenkomanija turės sprusti kaip neprašytas svečias iš Baltgudijos. Maišytuose gi parapijose Vilniaus ir Gardino gub., kur gyvena mišrium lietuviai su baltgudžiais, turės buti lietuviškoji tik ir baltgudiškoji kalba, teip kad lenkomanijai nė vietelės neliks mūsų krašte. Suprantą tai ponai lenkomanai, todėl ir pyksta ant Šventojo Tėvo. O „Dziennik Wileński“ — Vilniaus lenkomanų laikraštis sako, kad toji žinia, jog baltgudžių kalbai suteiktos pilietiškos tiesos bažnyčiose, lenkams vistiek kaip „perkuno trenksmas nuo giedro dangaus“ Mat vargdieniai buvo įsitikėję į savo laimėjimą, buvo tikri, kad „klapai“ bus jų amžinai ir tik štai — viskas jiems sprudo iš po kojų ir jie mato, kaip jų visa išsvajota. Lenkija nuo jurių lig jurių stačia galva nudardės nuo savo aukščio,

Teip, ištikro jiems skaudi tai žinia!

Bet mes iš to tiktai džiaugtis tegalime, kaip ir baltgudžiai. Mes tik pasveikinti turime baltgudžius su tuo dideliu laimėjimu, o ponams lenkomanams pavelyti „laimingo kelio“ iš mūsų padangės!

## Svarbiausieji atsitikimai.

**Omske** (Sibirius) užmuštas Akmolino sryties gubernatorius Litvinovas.

Netoli **Tifliso** (ant Kaukazo) ant vieno kaimo užpuolė 15 plėšikų, gyventojus apiplėšė ir nušivarė gyvulius.

**Persijos Šachas** (karalius) pasirašė po duotąja persams konstitucija ir prisižadėjimu neišvaikyti parlamento dviejų metų laike.

**Pracuzijoje** priimti liko įstatymai galutinai atskirianti valstiją nuo bažnyčios. Pagal tų įstatymų visos bažnyčios, klioštorių, vyskupų ir seminarijų rumai pereina į valstijos turtus. Bažnyčiose galima laikyti dievmaldystes tik gavus tam tikrą valdžios leidimą, kurs išduodamas yra visiems metams paprašius bent dviem parapijonų.

**Šventasai Tėvas** atskirė nuo bažnyčios marijavitų mokslo vadus ir platintojus.

## Žinių-žinėlės.

**Vilnius.** Gruodžio 30 d. 3 val. prasidės penktas visuotinas Liet. Mokytojų sąjungos susivažiavimas ir tęsysis iki sausio 1 d. 1907.

— Gruodžio 27 d. atsiveria pirmoji Lietuvių dailinikų paroda.

**Petrapolis.** Stačiatikių sinodas suruošė atsišaukimą į parapijų dvasiškiją. Tame atsišaukime įsakyta dvasiškijai kviesti gyventojus pildyti piliečių pareigas ir gerbti carą ir Cerkvę. To atsišaukimo sumanymas bus paduotas apsvarstyti ministerių tarybai

— Vidaus dalykų ministerio pagelbininkas Gurko, kurs padarė su Lidvaliumi sutartį dėlei duonos pristatymo, apie ką jau rašėme savo laike, žadą paduoti į teismą kelis rusų laikraščius už „apšmeižimą“ jo vardo. Jų tarpe randasi ne tik pirmeiviški dienraščiai, bet ir juodašimtiški, kaip „Novoje Vremia“ ir „Moskovskija Viedomosti“.

---

Redaktorius ir leidėjas kunigas Juozupas Ambraziejus

M. Kuktos spaustuvė. Dvorcovaja, 4.

la apuda teksto (*Espero Katolika*, n° 37, p. 199), ke D-ro M. parolas pri la falsaj religioj. Estas ja observebla kaj konstatebla, ke la Katolikismo konservis ĉiam, ĝis hodiaŭ la saman doktrinon, ke ĝi eltiris el la Evangelio, laŭ la bezonojn de la tempoj kaj homoj, t. e. laŭ la progreso de l'homaro, novajn moralajn aplikadojn de la malnovaj moralaj principoj. Atentinda ekzemplo estas la aplikado de la Evangeliaj principoj al la sociala vivado. Oni do ne povas diri, ke la Katolikismo perdis « sian primitivan purecon. »

4. — Punkto pri kiu ni plene konsentas kun D-ro Vallienne estas ĉi tiu. D-roj Vallienne kaj M., — aŭ por pli larĝigi la ideon, la sciencistoj kaj la teologiistoj *ne parolas la saman lingvon*. Ekzemple, la vortoj « kredo » « rivelacio » (aŭ « rivelado ») ne havas por ambaŭ la saman signifon. Tiamaniere la diskutado estas necese konfuza kaj kreas bedaŭrindajn malkompreniĝojn.

Mi plidiros se la teologiistoj iafoje parolas pri scienco kun ne sufiĉa kono, same la sciencistoj iafoje parolas pri religio katolika kun ne sufiĉa kompetenteco.

Mi volas esperi, ke ambaŭflanke oni provas forigi tiujn gravajn kaŭzojn de malkompreniĝo, ĉar mi konvinke kredas, ke Scienco vera, kaj vera Religio ne devas kaj eĉ ne povas esti malamikoj; ili havas la saman finan objekton, Vero; ili devenas el sama fonto, Dio. Ekzistas veraj sciencistoj, kiuj estas bonegaj katolikoj. Ekzistas same teologiistoj kiuj estas veraj sciencistoj. En ili do ekzistas fakte la unuiĝo de Religio kaj Scienco. Se tiu debato povas iomete utili al la dezirinda unuiĝo kaj amikiĝo, ĝi atingos la solan celon pro kiu mi ĝin plezure daŭrigas.

ÉM. PELTIER.

*P.-S.* — Ni tre dankas la Direktoron de *Internacia Scienca Revuo*, kiu publikigis (n° Junia) la artikolon de D-ro Melin.

## Virina dediĉo.

---

Sur blanka lulilo anĝelo kliniĝas :  
 « Eŝtaĵo el lum' en mallumon sendata,  
 Sub miaflugilo ripozu ŝirmita,  
 Danĝera ĝi estas, la voj' enirita,  
                     Knabino! »

— « Anĝelo, jen mi, servantino de Dio!  
 Fariĝu al mi laŭ la via parolo. »

Nun ĝoje gardanta anĝelo ekkantas :  
 « Al pura, al sankt' edziniĝo mi vokas!  
 La kverkon fortikan hedero ornamos; —  
 Subteno *li* estos; sindone *vi* amos,  
                     Edzino! »

— « Anĝelo, jen mi, servantino de Dio!  
 Fariĝu al mi laŭ la via parolo. »

Rideto briligas anĝelan vizaĝon :  
 « Virino, akceptu dolĉegan feliĉon!  
 Ĉe brusto amanta ripozos trezoro,  
 Infano karesa, ravego de l'koro,  
                     Patrino! »

— « Anĝelo, jen mi, servantino de Dio!  
 Fariĝu al mi laŭ la via parolo. »

Malgaje plorante anĝelo murmuras :  
 « Filino de Dio, la edzon amatan  
 Redonu al Dio; daŭrigu pilgrimon,  
 Ĉar Dia la forto forpelos la timon,  
                     Vidvino! »

— « Anĝelo, jen mi, servantino de Dio!  
 Fariĝu al mi laŭ la via parolo. »

...Hodiaŭ anĝelo kun paca vizaĝo  
 Kompate alvokis : « En hejman ĉielon



Alflugu : plu estos nek larmoj, nek morto  
Por vi, sed nur lumo, feliĉo kaj forto.

Kristanino ! »

— « Anĝelo, jen mi, servantino de Dio,  
Fariĝu al mi laŭ la via parolo. »

Originale verkis en Esperanto, por *Espero Katolika*. S-ino M.

## PAĜO DE L'DIREKTORO

**Novaj Delegitoj.** — Ni altiras la atenton de niaj legantoj al la adresoj (sur kovrilo de *Espero Katolika*) de niaj novaj Delegitoj por *Holando* kaj por *Nova Zelando*. Niaj amikoj tre kuraĝe laboras, en tiuj landoj, en kiuj, espereble ni havos baldaŭ multon da samideanoj.

**Preĝaro.** — Mi ne povis labori tiom, kiom mi esperis. Pro tio la Preĝaro estas ankoraŭ en presado. Ni *insiste* petas la subskribintoj, kiuj ne ankoraŭ pagis, ke ili bonvolu *sendi mem la monon*, — por eviti al ni sendon de cirkuleroj, de pagordo per poŝto, k. t. p. — Ni povos liveri la Preĝaron kun ordinara bindaĵo (ĵaspa tranĉaĵo) por 60 fr. plie de la prezo de l'libro. Por luksaj bindaĵoj, prezo laŭ interkonsento kun la mendanto.

**Kongreso.** — Dum la *Tria* okazos specialaj kunvenoj por la katolikoj

Unue okazos Diservo en la katolika preĝejo de Cambridge, kies estro estas M<sup>sr</sup> Scott. La tago ne estas ankoraŭ absolute fiksita<sup>1</sup>. Monsinjoro L. Giambene, el Romo, arkivisto de la Sankta Kongregacio de Indulgencoj kaj Profesoro de *l'Ligo de la Fido*, afable konsentis fari la predikon en Esperanto.

Okazos ankaŭ du aliaj kunvenoj : tiu de la Katolikaj Pastroj, kaj tiu de la katolikaj komercistoj kaj Industriistoj. Ni petas niajn amikojn, ke ili tuj sendu al ni sian

<sup>1</sup>Kredeble en la dimanĉo 11-a de aŭgusto.

nomon, por tiuj kunvenoj. (Tiu informo neniel devigos la sendanton al ia aliĝo al la decidoj aŭ al ia kotizaĵo.)

**La Kolekto de « Espero Katolika ».** — La 1<sup>a</sup> Serio (ĝis la pligrandiĝo, marto 1906) estas aĉetebla *bindita* : *a*) duontolaĵa bindaĵo por 1 fr. (40 Sd.); *b*) duon-« bradel » bindaĵo por 1 fr. 25 (50 Sd.) Ĉiuokaze, la sendelspezoj estas pageblaj *plie*.

**Himnoj kaj Kantoj por la Katolika Diservo dum la 3<sup>a</sup> Kongreso.** — Ni ricevis tre belatajn poeziojn, kanteblajn per konataj arioj. Ni publikigos la elektitajn en *Espero Katolika Julia*. Ni ankaŭ ricevis belegan *Patro Nia* por kvarvoĉa ĥoro (soprano, alto, tenoro kaj baso). La aŭtoro estas S-o Prof. Johano Gothardo, fama muzikkomponisto Vien'a. Ni *tre, tre* deziras, ke tiu bela verko estu aŭdata dum la meso por Esperantistoj. Sed... oni bezonas gekantistojn bonvolajn. Ĉiuj katolikaj kongresanoj kapablaj kanti, kaj akceptantaj parton en tiu ĥoro; estas petataj sendi sian vizitkarton al S-ino Joze Guivy, 104, rue George-Sand, Tours (I.-et-L.), Francujo, kun unu el la vortoj *soprano, tenoro, alto, baso*. — Ili poste ricevos la muzikaĵon kaj povos ĝin lerni antaŭ la kongreso. — *Skribu tuj; ne atendu morgaŭan tagon!*

**NOTO.** — *Plezurege ni anoncas, ke P-o Richardson (Institut S<sup>t</sup> Louis, Bruxelles) nun resaniĝis kaj povas plenumi sian oficon de Sekretario, por la katolikaj kunvenoj.*

## PROPAGANDA KRONIKO INTER KATOLIKOJ

### FRANCA

**Kongreso « Jeanne d'Arc ».** — Fine de majo okazis en Parizo tiu kongreso katolika. Kelkaj ĵurnaloj publikigis raporton en kiu oni legas :

« Kongresanino petas, ke *Esperanto* fariĝu la lingvo de estontaj Kongresoj internaciaj de katolikoj. Episkopo, M-ro Foucault, respondas ke Esperantismo estas entrepreno el framasona inspiro, kuj rifuzigas la proponon. »

Kiam ni konis tiun informon, ni tuj skribis al M-ro Foucault, dirante ke, certe, lia bonfido estis trompata de tiuj, kiuj liveris al li informojn pri Esperantismo. Ni ne dubas, ke Lia Episkopa Moŝto sendos al ni respondon klarigan, por detruĝi la tre malbonan impreson kaŭzitan en la katolika Esperantistaro per tiu diro.

**La Réplique**, ĵurnalo de Tours, kaj **Le Peuple Français**, granda ĵurnalo katolika de Paris, publikigis nian proteston kaj niajn klarigojn pri la *absoluta neŭtraleco* de Esperanto.

Aliparte ni scias, ke S-o L. de Beaufront, je l'onomo de la S. f, p. E., skribis al M-ro Foucault. Same faris aliaj Esperantistoj.

Esperable tiu bedaŭrinda afero bone finiĝos kaj utilos por pli konigi Esperanton kaj *Espero Katolika*.

**Kontraŭ Esperanto.** — *L'Univers*, granda ĵurnalo katolika de Paris, publikigis bedaŭrindan artikolon de S-o Arthur Loth kontraŭ Esperanto. Ni ne povis ĝis nun legi la artikolon; sed oni skribis al ni, ke la artikolo rediras la malnovajn, milfoje rebatitajn, diraĉojn kontraŭ Esperanto. Plie, oni provas elmontri ke lingvo internacia estas kontraŭ la instruado Biblia kaj katolika. Tio estas simple ridinda, post la *Apostola Beno* de Pio X-a, sendita al *Espero Katolika* kaj al ĝiaj kunlaborantoj!

Tiu-okaze, ni tre petas niajn amikojn, ke ili bonvolu ĉiam *rapide komuniki al ni la atakojn aperantajn en katolikaj ĵurnaloj aŭ gazetoj*, por ke ni povu tuj sendi proteston kaj respondon.

**Le Nouvelliste de la Sarthe** publikigis artikolon kontraŭ Esperanto (en N-o de 23-a Maj.). Sed ĝi tre volonte presis, poste, respondon de S-o Chapron, sekretario de la grupo Esp., *Le Mans* (27 Maj.), kaj respondon senditan de ni (4 Jun.).

**Nova Grupo Katolika en Parizo.** — La 21-an de Majo, S-o L. de Beaufront faris paroladon pri Esp. ĉe la *Association Franciscaine*, 117, Bd Raspail. La rezulto estas fondo de Grupo Esperantista *Espero Katolika* interŝanĝas kun la tre interesa gazeto *L'Action Franciscaine*.

Ŝajnas, ke malfavora vento blovas kontraŭ Esperanto ĉe la katolikoj! *Niaj amikoj estas petataj energie bataladi por la plena neŭtraleco de Esperanto*, ĝin elmontrante senlace per artikoloj en gazetoj, per paroladoj, ktp. — Ili bonvolu sendi al ni informojn pri siaj bataloj!

**Lorena Esperantista ĵurnalo** (Maja), organo de l'Grupo de Nancy, afable anoncis la baldaŭan aperon de nia *Preĝaro*. Koran dankon.

**Tra La Mondo** (Majo), afable parolas pri nia ĉefartikolo aprila (*Progresado aŭ Morto*, II-a parto). Tiu numero de T. L. M. aperis kun nova, multe pli arta, kovrilo. Ne nur la vestaĵo estas valora, sed la enhavo. T. L. M. pli kaj pli fariĝas interesege, kaj vere plenumas siajn promesojn. Em. P.

## DIVERSLANDA

**Hispana.** — La *Verdad* (Majo 28-a) en *Notas Esperantistas*, aludas la artikolon de la Direktoro de *Espero Katolika*, kaj faras alvokon al la Hispanaj katolikaj Esperantistoj, por ke ili abonu *Espero Katolika*. Se ni havus en ĉiu provinco ĵurnalon tiel energie propagandeman kiel la *Verdad*, *Espero Katolika* kvarobligus sian abonantaron en unu jaro. Tion ni deziregas!

— Ni plezure konigas, ke S-o Juan de la Cierva, el la patronaro de Esperanto, estas nun Ministro Hispana. Tiu Altestimata Sinjoro estas la bofilo de nia amiko kaj fervorega batalanto S-o R. Codorniu. Ni plej kore kaj ĝoje gratulas lin kaj S-on J. de la Cierva.

**Usona.** — En *Perkins Institution*, Boston (Mass.), estas kelkaj lernantoj katolikaj, kiuj lernas Esperanton.

La *Klubo* de tiu lernejo sendos blindulojn en Cambridge, kaj deziras ke la Delegitoj interparolu kun la Direktoro de *Espero Katolika* dum la kongreso. La klubo havis koncerton por kolekti monon por la blinduloj sendotaj al la kongreso.

**Meksiklanda.** — Du protestantaj revuoj, *El Esforzador*, kaj *El Testigo* fervore okupiĝas pri Esperanto. Prof. A. C. Wright faras kronikon en *El Testigo*, kaj kursón en *El Esforzador*. En tiu ĉi gazeto, li afable rekomendis *Espero Katolika* al la legantoj.

**Litova (Ruslando).** — Nia amiko kaj kunlaboranto, P-o A. Dombrovski, forlasis la profesoradon por sin dediĉi al la tasko de Ĵurnalisto. Li direktas tre gravan monatan revuon en lingvo Litova, *Draŭgija (Societo)*, kaj bis-semajnan ĵurnalon *Nedeldienio Skaitymas (Dimanĉa Legado)*. Krom tio li estas Prezidanto de *Litova S. Kazimira Societo*, por la eldonado de piaj kaj utilaj libroj en lingvo Litova.

*Dank'al Esperanto*, kaj al la afabla helpo de M-ro L. Giambene, li ricevis specialan benon kaj aprobon de Pio X-a por la Societo kaj por la gazetoj.

*Draugija* informas pri la plej gravaj Esperantistaj gazetoj, inter kiuj estas *Espero Katolika*.

La Esperantaj rilatoj de P-o Dombrovski kun Romo montras la neceson de *Internacia Oficejo* ĉe la Vatikano. Tiu Oficejo, uzante Esperanton, farus grandegan servon al la tutmonda katolikaro.

Adreso de P-o Dombrovski : en *Kovno* (Rusujo).

**Japana.** — Juna katolika Japano skribis al nia Direktoro tre kortuŝan poŝtkarton. Jen lia adreso S-o Fr. Jiro Kimura, n° 36, Kitayamabushi, Ushigonu. Tokio, Japanujo. Li deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj, kun katolikoj. Li intencas propagandi inter la katolikaj junuloj de sia lando.

L. MILHO.

## UNIVERSALA KOMUNIKILO.

(Rezervita al la abonantoj de *Espero Katolika*.)

**La Coopérative catholique de Fourques** (Pyr.-Or., France). — *La Katolika koperativo de Fourques*, antaŭnelonge fondita de P-o Andreu, parokestro, liveras por malaltaj prezoj la bonegajn *vinojn* kiujn oni rikoltas en *Roussillon*. Skribu al P-o Andreu, en *Fourques* (Furk'), Pyr.-Or., France.

« **Practical Esperanto** », estas la titolo de *korespondadakurso* farita de nia kunbatalanto angla, S-o D. P. Hugon, *Bohemia, Westholm green, Letchworth (Herts.)*, Anglujo. Ĉiu folio 4-paĝa enhavas *Lecionon elementan*, kaj *Lecionon superan*. — Tre rekomendinda al la Angloj. — Unu folio 15 centim. — 12 Folioj 1 fr. 85.

**La Slosiloj Cefeĉ** estas de nun aĉeteblaj pogrande nur ĉe *Internacia Esperantista Propagandejo*, fondita por tiu celo de la plej gravaj Anglaj propagandistoj. Adreso : *Merton Abbey, London, S. W.*

La firmo publikigis beletan libreton binditan, en kiu estas 7 Ŝlosiloj, en lingvoj Angla, Franca, Germana, Hispana, Itala, Sveda, Dana. — En preparo : Ŝlosiloj en lingvo Rusa, Ĉeĥa, Portugala, Holanda.

**Tutmonda Labora Societo** havos specialan kunvenon en Cambridge, dum la kongreso.

Ĉiuj amikoj havantaj interesajn proponojn por prezenti, rilate al la « laborista movo », estas petataj ilin sendi kiel eble plej baldaŭ al la Sekretario, S-o P. Blaise, 4, rue du Bourg-Tibourg, Paris, IV<sup>e</sup>.

Ĉiuj bonaj ideoj estos disputataj dum la Cambridge'a kunsido. — Inter aliaĵoj estos priparolataj

1<sup>e</sup> La rimedoj uzotaj por disvastigadi Esperanton inter la gedungitoj ;

2<sup>e</sup> La fondo de sekcioj en ĉiuj landoj ;

3<sup>e</sup> La elekto de internacia konsilantaro.

Por klarigoj pri la Societo, sendo de regularo, turnu vin al la supredonita adreso.

La « *Librairie de l'Esperanto* » intencas eldoni en Esperanto unu el la muzikaĵoj de Lucien Bernot, la konata Esperantisto, kiun la Morto kruele atingis en lia juneco.

Por ke la traduko de la poezio estu inda je la muziko, la eldonanta firmo malfermas konkurson kun premio da 50 frankoj.

Petu de la dirata firmo la regularon de tiu konkurso (*De la 1-a de Julio, la adreso estos 15, rue Montmartre, Paris.*)

**Perkins Institution.** — S-o William Graham, katolika lernanto en *Perkins Institution*, Boston, Mass. Unuigitaj Ŝtatoj, Ameriko, deziras korespondadi en Esperanto kun katolika pastro.

**Rivista del Sacerdote apostolico** (Revuo de apostola pastro). — Tiu ĉi Revuo, laŭdita de Lia Sankta Moŝto Pio X-a, eldonas ĉiumonate resumojn de la plej interesaj predikoj de la Patroj, Doktoroj kaj Sanktuloj de Eklezio; resumas predikojn dogmajn, moralajn, katekismojn de la plej elokventaj predikistoj estintaj kaj nunaj, italaj, kaj fremdaj; kaj eldonas historiajn ekzemplojn; teoriajn kaj praktikajn regulojn tre utilajn al la sankta ministraĵo.

Prezentas mallonge sed ordige, laŭ la plej ortodoksa ekzegezo de la Patroj kaj de la plej ŝatindaj predikistoj la Evangeliajn homeliojn por ĉiuj dimanĉoj.

Tiu ĉi revuo (itala) eldoniĝas (64 paĝoj ĉiumonate) ĉe la *Preskatolika Unuiĝo en Macerata* (Italujo), Jarobono en Italujo: 6 fr.; eksterlande, 7 fr. 50.

El tiu ĉi Revuo oni elĉerpis kaj aparte eldonis la verkon de Alberto Magno: *La Sakramento de l'amo*; 127 paĝoj in-8°; prezo de ĉiu numero 1 fr. 50.

Sin turni al la direktoro de l'Revuo mem *Monsinjoro Roberto Soldini*, Via Carlo Alberto, 9, *Macerata* (Marche, Italujo).

## ABONMONOJ RICEVITAJ

**Por la 3-a jaro. (1905-1906).** — Abonon aŭ plenigon de abono ni ricevis de :

H. Hélie (Maison-Alfort). F. Cauwenberg (Westmalle, Belg.). Mistler (Saint-Claude). Respectat (Montréal, Kanad.). P. Gorensach (Santo-Leonardo, Ital.). Brossard (Laprairie, Kanad.). Grafo Chandon de Briailles (Épernay).

**Por la 4-a Jaro : a) de oktobro 1906-1907.** — Abonon ni ricevis de :

J. Duchauxix (Merdrignac). H. Hélie (Maison-Alford). Devoucoux (Alfortville). Bouchet (Tours). P-ro Bouquerel (Épinay-sur-Seine). P-ro Schneeberger (Laŭfon, svis.). P-ro F. Loopez (Tuy, Hispan.). E. Cano (Siguenza, Hispan.). P. Tobar (Madrid). Macary (Lyon). F. Cauwenberg (Westmalle, Belg.). Mistler (Saint-Claude). Michel (Grenoble). Codorniu (Murcia, Hispan., por 3 abon.). A. Lefebvre (Paris). G. Davidov (Saratov, Rus., por 3 abon.). F. Bernard-Louis (Besancon, Saint-Claude). Rawicki (Wloclawek, Polujo-Rus.): Letenneur (Paris). Respectat Montréal, Kanad.). Rev. H. Camilo (Habana, Cuba). Grupo Esp. de Bourges (S-o Esselin). Grup. Esp. Varsovia. Allin (Mazières). Billard de Veaux (Toulouse). P-o Honineks (Laplante, Belg.). Brossard (Laprairie, Kanad.). L. Jorrand (Aubusson). J. Cyrot (Beaune). Grafo J. Chandon de Briailles (Épernay). P-o Pigeant (Le Vésinet). De Rey-Pailhade (Béziers).

*b) de Januaro 1907-08.* — Abonon ni ricevis de :

Buret (Sainville). A. Martin (Mâcon). P-o K. Myslik (Pyrha, Aŭstr.). Madon (Tours, nur 2 fr. 50). M. Llira (Sabadell, Hispan.). A. Ribalda (Sabadell, Hispan.). Evstifeieff (Genevo). Drudin (Lyon). M. Esteban (Burgos, Hispan.)

*c) de marto 1907-08.* — P. Gorensach (Santo-Leonardo, Ital.).

(Sekvo venos.)



## EN LA MONDO ESPERANTISTA

### PROMENADO TRA LA GAZETOJ

**Antaŭparoleto.** — Mi plezure akceptis la oficon raporti pri la Gazetoj kaj kroniki la librojn Esperantistajn, sed mi postulis de la Direktoro de *Espero Katolika* plenan liberecon por esprimi *mian opinion* en tiuj kronikoj! Mi ne intencas esti konsilanto, nek reformisto; mi nur deziras esti sincera kritikisto. (La Redaktoro de rubriko: *En la Mondo Esperantista.*)

**Novaj gazetoj.** — Honoran lokon kaj saluton al la novaj kunfratoj! En *Ameriko* naskiĝis *Amerika Esperantisto* (Oklahoma City) de kiu ni ricevis nur *du* numerojn (la lasta ricevita estas N-o 4-a, Januaro); kaj *The American Esperanto Journal*, organo de *The American Esperanto Association*. La fervora kaj lerta sekretario de tiu gazeto estas nia amiko, S-o J.-F. Twombly. De la fondo de tiu revuo, la grupoj dekobligis en Usono.

El Polujo venis la bela, grand-formata *Pola Esperantisto* (en Leopolo, aŭ Pole Lwow).

La Bulgaroj fondis novan *Bulgara Esperantisto* multe pli bela ol la malnova. La du unuaj N-oj estas redaktitaj preskaŭ tute en Bulgara lingvo. Tio ŝajnas al ni *tre saĝa* por komencanta nacia gazeto.

*Ĉasapis Ĉeskych Esperantistu* estas la organo de la Bohemaj Esperantistoj. Redaktita de S-o Ed. Kühln, preskaŭ tute en Esperanto, escepte la *Kroniko* pri propagando kaj gazetoj. La N<sup>o</sup> maja enhavas tre detalan artikolon pri la *Internacia Helpa Mono*, kun tabelo por la Bohemoj.

La *Alĝeraj Esperantistoj* komencas la publikigadon de *Afrika Esperantisto* (N<sup>o</sup> 1, majo), kies bonega celo estas kunigi en Societon la « izoluloj » de la vasta kontinento Nigra.

*Japana Esperantisto*, oficiala organo de *Japana Esperantista Societo*, estas forta pruvo, ke Esperanto ne taŭkas sole por la Eŭropanoj.

En Suda Indio (*Champion Reefs, Mysore states*) bataladas *La Pioniro*, en lingvoj angla kaj Esperanto.

En Brazilujo, la Esperantistoj montras ke la Sud-Amerikanoj estas tiel fervoraj, agemaj kaj praktikaj, kiel la Nord-Amerikanoj. Ili solenigis kongreson nacian kaj kreis belan Gazeton, *Bazila Revuo Esperantista* (32 paĝa).

Ni ne ankoraŭ parolis pri *Socia Internacia Revuo*, kiu aperas de Januaro, sur formato la plej granda el ĉiuj gazetoj (escepte *Eksport-Jurnalo*).

La desegnaĵo sur la unuaj kovriloj estis simple abomeninda. Tiu de l'maja numero estas deca, sed kontraŭ-militista. La gazeto liveras multajn informojn pri la Socia movado en diversaj landoj. Mi ne komprenas kial niaj « fratoj » socialistoj atakis tiel, akre kaj erare la katolikojn, en multaj artikoloj, represante la malnovajn, milfoje rebatitajn diraĉojn kontraŭ katolikismo. (Precipe en la aprila N-o.) La artikolo *For la Vatikano* (apr., p. 1-3) estas pamfletaĉo, en kiu oni atakas la Jezuitojn (nature!), la Papon; rememorigas la « inkvizicion » (ĉiam!) kaj la bruligojn « in effigie » de 48,049, « vive » de 34,658 personoj! mokas preĝon, k.t.p. — Karaj fratoj, bonega kaj vere efektivebla plano de Sociaj Reformaj estus pli ĝustatempa en via gazeto, kaj pli utila al la homaro, ol tiuj malicaj atakoj.

*Foto-Revuo* (France kaj Esperante) estas tre utila al la ŝatantoj de fotografi-arto. *Eksport-Jurnalo* (de kiu ni ricevis nur unu numero) komenciĝis en februaro; liveras al la komercistoj kaj industriistoj. Multegon da informoj.

*Lumo* estas organo de la *Tirnova Esperantista grupo* (Bulgarujo). Ni ricevis nur unu numeron stilografiitan.

*Eho Esperantista* estas monata kaj aparta aldono de *Das Echo*, semajna Berlina granda gazeto (kiu, krom tio, havas ĉiusemajne rubrikon por Esperanto). S. Karl Steier, en Berlin S, Plan-Ufer, 41, plezure akceptos la kunlaboradon de niaj legantoj.

Ĉu vi konas *Flugila stelo*? Ĝi estas organo stenografia, laŭ la sistemo alfarita de la simpatia Prezidanto de l' 2-a

kongreso, P-o Schneeberger (Laŭfon, Svis.). Ni tre rekomendas ĝin al ĉiuj stenografistoj.

Al ĉiuj novaj kunfratoj ni deziras plej rapidan kaj daŭran sukceson.

Prof. E. LIME.

## BIBLIOGRAFIA KRONIKO

De longa tempo oni ne kronikis la librojn en *Espero Katolika*. Tial la Direktoro metis sur mian skribotablon tutan bibliotekon! La eldonistoj kaj aŭtoroj bonvolos pardoni se mi ne englutos en unu fojo tiun vastegan nutraĵon...

**La Centra Oficejo**, kiu faris tiel grandan servon al la 2-a kongreso, disdonante, dum la kunsidoj, dokumentojn plej interesajn, daŭrigas sian agadon. Ĝi presigis tre gravajn dokumentojn, nome: *Esperantista Societaro*, kies unua eldono, korektita ĝis la 30-a de Junio 1906, estis sendita *senpage* al la Esperantistaro (nun aĉetebla por 1 fr. 50 = 60 Sd.). La 2-a eldono, korektita ĝis la 31-a de decembro 1906, ĵus aperis, kaj kostas same 1 fr. 50. — Havinda de ĉiu Grupo Esperantista.

La partoprenintoj de la Geneva Kongreso surprize kaj plezure ricevis belegan raporton 128-paĝan pri la *Dua Universala Kongreso*. Ĝi estas plenega kaj intersega memoraĵo pri la Geneva neforgesebla kongreso.

**Ce la firmo Hachette** aperis, en literatura fako, *Inter Blinduloj* (130 p.) de mortinta D-ro Javal, pri kiu detale parolis ĉiuj gazetoj kun laŭdego; *La Revizoro* (de N. V. Gogol), 100 paĝ.; komedio tradukito de D-ro Zamenhof, jam publikigita en *La Revuo*.

*Grammaire complète d'Esperanto*, de S-o Camille Aymonier, estas komenco de nova kolekto de lernolibroj por Francoj. Dika volumo da 166 p., ĝi plene kontentigos la amantojn de gramatikaj reguloj. Taŭgas por sin perfektigi en la lingvo.

*Corrigé de l'Ekzercaro* de D-ro Zamenhof, france tra-

dukis, kun utilaj rimarkoj S-o L. de Beaufront. Konsilinda al tiuj, kiuj lernas Esperanton sen profesoro.

Ni jam anoncis la publikigon de *Esperanta Sintakso* (2-a eldono) de P. Fruictier, ĉe la *Presa Esp. Societo*. La firmo Hachette akiris la rajton publikigi la saman libron en la *Kolekto de la Revuo*. Prof. E. LIME.

## INTERNACIA HELPA MONO

Ni komunikas al niaj legantoj sistemon elpensitan de S-o de Saussure, Direktoro de *Intern. Sc. Revuo*, por esprimi internacie la monon. Tiu sistemo ne intencas forigi la naciajn, sed esti la *dua* por ĉiuj, kiel Esperanto estas la *dua* lingvo.

Sm = SPESMILO, Sd = SPESDEKO, S = SPESO (1 Sm. = 100 Sd. = 1000 S.) (10 spesmiroj estas la valoro de 8 gramoj da oro, laŭ orpropocio  $\frac{11}{12}$ .)

1 SPESMILO = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj =  $\frac{1}{2}$  dolaro = 1 rublo = 1 yeno (proksimume).

### Tabelo por ĝustegaj kalkuloj.

1 franko (Lat. U.) = 396 S.	1 Sm. = 2,526 fr.
1 silingo (Angl.) = 499 »	» = 2,003 s.
1 marko (Germ.) = 489 »	» = 2,046 m.
1 dolaro (U. Ŝ. A.) = 2052 »	» = 0,4874 q.
1 rublo (Rus.) = 1056 »	» = 0,947 r.
1 krono (Aŭstr.) = 416 »	» = 2,405 kr.
1 » (Stand. U.) = 550 »	» = 1,819 kr.
1 floreno (Hol.) = 825 »	» = 1,213 fl.
1 milrejso (Port.) = 2217 »	» = 0,451 mr.
1 » (Braz.) = 1121 »	» = 0,892 mr.
1 yeno (Jap.) = 1023 »	» = 0,978 y.
1 peso (Meks.) = 2019 »	» = 0,495 p.

Por traduki frankojn en internacia mono, sufiĉas multoblighi la francan sumon per 4. — Oni ricevas, kiel unuon, *S' pescentojn*. Oni poste ŝanĝas facile en Sm. aŭ en Sd., la du unuoj uzitaj. Ekzemple la abono de *Espero Katolika* estas 5 fr.  $\times 4 = 20$  Sc., = 2 dm. — Abono en Fran-

clando estas 4 fr.  $\times 4 = 16$  Sc. = 1 Sm. 60 Sd. La prezo de anoncoj estas : por tuta paĝo, 40 fr.  $\times 4 = 160$  Sc. = 16 Sm. ; por duona paĝo, 25 fr.  $\times 4 = 100$  Sc. = 10 Sm. Tio donas sufiĉe proksimuman egalvaloron.

Em. P.

## ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2, Austrujo.)

LUDO XIII-a. — La pola ludkomenco).  
Ludita en Stanislavovio.

BLANKO	NIGRO	BLANKO	NIGRO
Al. Wagner	Adolf Hauke	6. D — 2R	D $\times$ S
1. S — 4D	S — 4D	7. D — 5Ĉ (ŝ)	K — 2D
2. S — 4R. Eltrovis Amerikano		8. D $\times$ S	K — 5ĈD. Se K — 3K, 9K — 5Ĉ
Blackmar, prilaboris kaj rekomendis la pola ŝakmajstro Ignacy Popiel 1893. La plejnovaj esploradoj pruvas tiun ĉi ludmanieron malfavoran por la Blanko. La defendo de N. estas tamen malfacila kaj komplikita.		9. Ĉ — 2R	D — 3Ĉ
		10. D $\times$ S (ŝ)	K — 2R
		11. Ĉ — 5D	D — 3D
		12. Ĉ $\times$ K	D $\times$ Ĉ
		13. D $\times$ T	Reĝsaltas
		14. D — 3K	Ĉ — 3K
		15. O — o — o	T — 1Ĉ
	2... S $\times$ S	16. S — 3TD	Ĉ — 4R
3. Ĉ — 3KD	Ĉ 3KR	17. D — 3R	T $\times$ S
4. K — 5ĈR	K — 4K	18. S — 4KR	K — 4K
5. K $\times$ Ĉ	SR $\times$ K ol Plibone (SĈ $\times$ K)	19. Ĉ — 4D.	Cedas.

El la ŝakmondo. Unuan prezon en la VI-a Sveda problemturniro ricevis inter 134 problemoj la konata komponisto P. H. Blake, Liverpolo, kun la sekvanta admirinda tri-iraĵo.

B. (10 pecoj) R1KR, D8KD, Ĉ5ĈD kaj 5R, K3ĈD kaj 4KR, S5KD, 6KR, 3ĈR, 7ĈR.

N. (11 pecoj) R5R, T1R, Ĉ1ĈD kaj 1D, K2TD, S3ĈD, 2R, 6KR, 7KR, 2TR, 4TR.

British chess Federation publikigas duan internacian problemturniron. Postulata estas originala Tri-iraĵo (direkta ŝakmortigo per la 3-a iro de B). Partopreno senpaga. Templimo 30-a Sept. 1907. Sendu la problemojn sub

adreso : *L. P. Rees*, S<sup>t</sup> Aubyn, Redhill, Surrey (Anglujo).  
A. WAGNER.

*Kongreso.* En Kambriĝo ekzistas nur du ŝakkluboj, la universitata kaj la urba. La unua estos fermita dum la kongresa semajno ; la dua estas duonprivata, kaj ĝiaj anoj estas la gastoj de ĝia Prezidanto. Tiu ĉi sinjoro tre gastame proponas, ke li akceptu bonvene, unu vesperon, Esperantist-ŝakludantoj, sed nur ĝis limigita nombro, ĉar li ne havas spacon por amaso. La aranĝoj ne estas jam plenumitaj, sed la sekretario, de Esp-ista ŝakluda societo, penas inviti ĉiun anon de la Societo (per letero, se eble, aŭ almenaŭ per anonco ĉe la kongreso) partopreni en la ludado. Tial, li deziras, ke ĉiu Societano skribu al li, sciigante sian intencon ĉeesti. Kelkaj jam tion sciigis. Se la propono efektiviĝos, la Kambriĝa Prezidanto provizos ŝakludilarojn, kafon kaj manĝaĵeton.


En Keigley, Bow St. Anglujo.

J. ELLIS, *Sekretario, Esp-ista Ŝakluda Soc-o.*

### Problemo XIII-a

Komponis Barono  
F. Wardener, Taus (Bohemujo).

Nigro 5 pecoj.



Blanko : 6 pecoj.

Blanko komencas kaj mortigas per la 2-a iro.

### Solvo de problemo XI-a

(R. Kindley.)

1-a iro de B : D — 8T minacas.  
Ĉ — 3 K.

Se K — 4R	2. D × K1T (m)
Se S — 4R	2. D — 8Ĉ (m)
Se T — 4R	2. D — 8D (m)
Se Ĉ6Ĉ iras	2. D — 4D (m)

*Guste solvis* Novejacque en  
Valencio.

— Kapitano Reynier (Lyon).  
membro de Soc. de Esp.-Ŝakludistoj.

*Le Gérant* : L. MONTEBAULT.

Imprimerie-Librairie de Montligeon. — La Chapelle-Montligeon (Orne).

**ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE** (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio : Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris ; abono jara : 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia !

**REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS** (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono : 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

**JUNA ESPERANTISTO**, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

✧ **LE SOUVENIR**. Monata ĵurnalo literatura : 1 frank. Unuiĝo poŝta 1 fr. 50. Direktoro Fondatoro : XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro. B<sup>d</sup> Anspach, 83, Bruxelles.

**KOLEKTISTOJ** : S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

## **INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ**

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj skribi por pluaj sciigoj al la Direktoro

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO

**NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS**

**AKCEPTAJAJ SAMTEMPE**

(10-9)

**PENSIO POR GESINJOROJ GENEVO**. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

**FONTAN-PLUMINGO « FACULTY »**. — Ni esperas plaĉi al niaj legantoj vendante al ili tiun bonegan « Skribilon ». La « Fontan-Plumingo », aŭ plumingo kiuj enhavas inkon, estas ordinare tre multekostaj (10. aŭ 12 fr.). Post konsento kun vendisto ni povas liveri la « Faculty » plumingon por la nekredebla prezo de 3 fr. 75 (prenota en nia Oficejo), aŭ 3 fr. 90 aŭfrankite kaj rekomendite.

**JUS APERIS** : *Hebrea Kalendaro*, de Pastro Jakobo BIANCHINI. (Malmultaj ekzempleroj. *Rapidu mendi.*) 0 fr. 20

**LES LANGUES VIVANTES** (*La Vivaj Lingvoj*). Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P-o Em. Peltier. Eldonita de Pariza firmo Bloud.

<b>Abonoj :</b>	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	I LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Eskter Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K. — Specimenon senpage.

**LA REVUO.** — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D<sup>o</sup> ZAMENHOF. — Ĉe Hachette k. K<sup>o</sup> Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6; ceteraj landoj : Fr. 7.

**LINGVO INTERNACIA**, centra organo de la Esperantistoj, la plej malnova gazeto (1895), eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono : 5 fr. — Kun Literatura Aldono 7 fr. 50. Specimeno senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

**ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO**, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco; industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝejoj.

Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI (2-a eldon.) 0 fr. 65

Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI 1 fr. 80

(Aĉetebraj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

**PREĜARO** (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun ekpresigās (por la subskribintoj). 3 fr. »  
nua kajero (por ne subskribintoj). 2 fr. 50